

Johann Wolfgang von Goethe,  
Trovita

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Mi tra arbaro  
Sencele iris  
Kaj trovi ion  
Mi ne deziris.

Ĉe l' vojo vidis  
Mi etan floron,  
Kaj ege tuŝis  
Ĝi mian koron.

Kaj kiam volis  
Mi ĝin deŝiri,  
„N rompu min!“, mi  
Ĝin aŭdis diri.

Kaj mi singarde  
Ĝin elterigis,  
Al mia domo  
Ĝin translokigis.

Alialoke  
Ĝi nun kreskadas,  
La eta planto  
Kaj plu floradas.

*Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1982-05-05.*

*MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)*

Johann Wolfgang von Goethe,  
Trovaĵo

*tradukita de Richard Schulz*

Mi vagis sola  
En la arbar'.  
Nenion serĉi  
Jen mia far'.

Enombre vidis  
Floreton mi.  
Lumanta stelo,  
Okulvizi'.

Al mi plukonta  
Jen ĝia vort':  
„Ĉu ke mi velku  
Al frua mort' ?“

Mi ĝin elfosis  
Kun la radik'  
Ĝin portis domen  
Al la larik'.

Replantis tie  
Ĝin en la fru'.  
Ĝi nun kreskadas  
Kaj floras plu.

*Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984-07.*

*Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj“, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*